

propra

Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)

26 (2 / 1999) LEA/G
MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete

Rezulto de la baloto 1999

La 15-a de marto 1999 estis la limdato, ĝis kiu la voĉdoniloj estu senditaj al la balotkomisiono. Partoprenis la baloton nur 34% de la aktivaj membroj. Ĉi tiu partopreno estas vere magra. En la baloto de 1997 voĉdonis 69% de la aktivuloj. Jen la rezulto:

		jes	ne	sindeteno
1-a prezidanto:	A. F. Stephan	19	0	2
Anstataŭanto:	(formala) Franz Knöferl	20	0	1
Sekretario:	(vakas)			
Kasisto:	Jiri Proskovec	20	0	1
Konsilantoj:	Friedel Bues	19	0	2
	Hans Rodewig	20	0	1
	Sebastian Hartwig	19	1	1
	Gary Mickle	21	0	0
Redaktoroj (Magazino):	Hans Rodewig	21	0	0
	Hans Jankowski*	20	0	1
Revizoroj:	Margot Stephan*	15	2	4

(* Eniris protestoj, pri kiuj ni informos en la venonta numero de la Magazino. La balotkomisiono rigardas ilin gravaj!)

Propono pri ŝanĝo de la oficperiodo ek de 1999 04 01 en tri (3) jarojn:

	20	0	1
--	----	---	---

Ni gratulas al la nova estraro kaj dankas la membrojn, kiuj sendis voĉdonilon. Venonta baloto okazos en la jaro 2002.

Düsseldorf, la 1999 03 17

La balotkomisiono
H. Meyer
Frz. Lenze

Raporto de la estraro

(1997 04 01 - 1999 03 31)

En la jaroj 1996, 1997 kaj 1998 ne estis eble aranĝi jarkunvenojn, ĉar helpantoj ne estis videblaj. Ni esperas, ke ni povos organizi ĝin en la jaro 2000, do, komenco de la nova jarcento; komenco de novaj aktivecoj.

Varbado: Hazarde ni povis uzi adresaron de esperantistoj en suda parto de Germanio. Ni preparis varbilon kaj alskribis ilin. La rezulto estis same NULO. Nur du abonis nian organon MAGAZINO, aliĝis neniu. Aliflanke helpis trovi abonantojn la nuntempe pli bona eksteraĵo kaj interesa enhavo de nia organo. Abonis ĝin esperantistoj en Berlino, Malsupra Saksio kaj Badeno. Krome ni ricevis infompetojn de esperantistoj, al kiuj ni ekspedis ampleksan inform-materialon. Nur unu aliĝis. Realigis kamaradino en Wuppertal.

Membrostato: 66 aktivaj (de tiuj 2 en eksterlandoj), 7 pasivaj membroj. Abonantoj: 15, en eksterlandoj 3. Mortis 5; ekŝiĝis: 3; abono finiĝis: 2

Kontaktoj: S.A.T. kaj S.A.T.-Amikaro, Parizo, TUTMONDE Pacifista Movado, Terrassa/Hispanio; Maldekstra Forumo, Berlin, Nacia Esperanto-Muzeo en Gray (Orientfrancio), Guy Cavalier (LEA-Komitato de S.A.T.) Fritz Hüser-Institut en Dortmund, S.A.T.-perantoj en Ĉeĥio, Anglio, Svedio, Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, ORF Vieno, Radio Polonia, Radio Pekino,

S.A.T.-ana grupo en Saporo k.a. MAGAZINO estas bone akceptata de legantoj. Gary MICKLE, la ĉefredaktoro, Berlin, aperigas ĉiam tre interesan enhavon, kiu kaŭzis diversajn abonojn i.a. de eminentaj esperantistoj. Kunlaboras Hans Rodewig, Hannover, kaj A.F.Stephan, Oberkirch. Kamaradecan dankon al la redakcia skipo!

MAGAZINO estas liverata al 91 aktivaj, pasivaj membroj kaj abonantoj. Krome ni interŝanĝas ĝin kun organoj kaj revuoj de Esperantomovadoj el diversaj landoj. G.Mickle zorgas, ke 130 ekzempleroj estas presataj, de tiuj ni uzas certan nombron por varbado.

La preparo de la organo kostas po ekzemplero (24 DIN-A5-paĝoj) minimume -.96 DM; ekspedo Germanion po 1,10 DM, eksterlanden po 1,50 DM Kovertoj po -.05 DM. Ĉiu kalkulo validas tiel longe kiel la prezoj ne altiĝos.

Ni gratulas al tiuj membroj, kies naskiĝjaron ni konas kaj kiuj festis t.n. rondan naskiĝtagon en 1998:

Fred Böhringer - 70
Thomas Bormann - 40
Manfred Führer - 65
Max Hollinger - 75
Walter F. Poppeck - 85
Jiri Proskovec - 35
Erich Seidemann - 90
Carl-Ludwig - 85

Oberkirch, 1999.03.10. A.F.Stephan

Kasraporto por la jaro 1998



*TUTMONDE Pacifista Movado de esperantistoj, Sidejo Terrassa (Hispanio), eldonos Adresaron-2000 je fino de 1999. Oni povas antaŭmendi: A.F.Stephan, Renchener Str.47, D-77704 Oberkirch
Prezo inkl.membreco - 15 gmk.*

LA MIGRANTO
Ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj



Ĉu informoj pri migradoj, naturamikaj domoj ktp. vin interesas? Abonu ĉe Aad Demmendaal-o.d.Brouw, Dirkslandhof 18, NL-3086 CC Rotterdam, kaj pagu poste la abonprezon - 15,- DM jare - al Willi Brandenburg Brinker Damm 24, D-48291 Telgte

A: Enspezoj (DM)	
Kotizoj kaj donacoj	1780,04
Repago de SAT*	690,--
Kotizoj k.donacoj por 1999 ..	343,--
	<hr/>
	2813,04
Enpago prunte**	308,44
	<hr/>
	3121,48
	=====
B: Elspezoj	
Preparo k eldono de la asocia organo MAGAZINO ...	1286,54
Informoj k. varbkampanjo	1420,99
Ĝirokonto-kostoj	88,50
Subteno de SAT	100,--
Kotizo al LEA-Komitato	30,--
Admin.kostoj	195,45
	<hr/>
	3121,48
	=====

* LEA/G pruntedonis al SAT por kovri la elspezojn de la kongreso 1997 en Augsburg 1000,- DM, de kiuj SAT repagis en la jaro 1998 690,- DM

** LEA/G pagas al SAT ĉiun jaron la elspezojn de la SAT-peranto en Germanio. Ĉi tiu raporto estas mia lasta, ĉar mi finis mian laboron ek de 1999.01.01. Jiri Proskovec en Dortmund transprenis la oficon. Mi dankas al Jiri.

Essen, 1999.01.02. K.H.Kersting

»Grüße aus Oberkirch« jetzt auch in Esperanto möglich

Besondere Grußkarte zur »Woche der internationalen Freundschaft«

> Salutoj el Oberkirch < ankaŭ ebla per Esperanto
Speciala salutkarto okaze de l' "Semajno de la amikeco"



Durch solche Ansichtskarten ist Oberkirch in der Esperanto-Welt bekannt geworden. Dazu gibt's Werbeprospekte, und auch Broschüren der Tourist-Information sind in Esperanto übersetzt worden.

Tiaj bildpoŝtkartoj konatigas la urbon Oberkirch ĉie en la Esperanto-mondo. Varbprospektoj kaj broŝuroj de la Turist-Infoficejo estas tradukitaj en Esperanto!

Pri detaloj informas:

Hermann HEISS, Lohstr.48, D-77704 Oberkirch (Tel: 07802 - 4856)
M. STEPHAN, Renchener Str.47, D-77704 Oberkirch
(Tel+faksilo: 07802 - 90 336)

Kokobataloj:

Kolektiva Konvencio

Kvankam eble ne ĉiu leganto akceptos la temon, mi skribas pri ĝi laŭ artikolo, kiun mi trovis en ĉiudimanĉe aperanta, senkosta, laŭ mi objektiva gazeto 'Der Guller' (dialektvorto por 'La Koko'). Ne ĉion de la teksto mi tradukis ĉar mi ne volas rabi tro da spaco de l' MAGAZINO por publikigi opinion, kiun mi nur parte jesas. Eble taŭgas la priskriboj por kamaradeca diskuto!

Alberto Stefano

La kolektiva konvencio en la germa-na metalindustrio prezentas ŝajne nur perdintojn. La metal-sindikato ja kalkulas la rezulton de 3,6 al 4,2 procentojn, sed lamentas pri la longdaŭra valido (14 monatoj). Kontraŭe la metalindustrio antaŭtimas entreprenajn bankrotojn, malaltiĝantaj vendosumojn, do, sekve perdojn de laborlokoj (kiel kutime!).

Aliflanke strikoj kaŭzas pli ruinigan efikon ĉu al la sindikata strikaso ĉu al la enspezoj de la direktoroj.

Kio malplaĉas al multaj civitanoj estas, ke en proksima estonteco certe la kontraŭuloj denove kunsidos por 'plibonigi' la interkonsentojn. Verŝajne ili interkonsentos vojmeze, foje iomete maldekstre, foje iomete dekstre.

La redakciano de la gazeto demandas, kial do okazis la antaŭaj 'bataloj', dum kiuj la partoprenantoj kvazaŭ luktis por profite kontentigi postulojn de ĉiu grupo? La ideologiaj kontrastoj jam delonge ne plu ekzistas (ĉu vere? red.). Aŭ ĉu oni ĉi

tiujn kontraŭecojn nur flegas por montri, ke por la membroj de la interesgrupoj estas prizorgataj?

La membroj atendas taŭgajn rezultojn por la ĉiutaga vivo, ĉar la vivokostoj iom post iom altiĝas.

Laŭ la redakciano realigas labor-donantoj kaj laborprenantoj en certaj entreprenoj komprenemajn konvenciojn, mem, ofte estontorientitajn. Do, tute sen sindikato kaj industriunuiĝo.

Mi krome legis, ke pro ne konataj kaŭzoj sindikatoj farizeas kiam estas necese pritrakti tarifojn en la propra organizaĵo. La germana tegmenta sindikato ekzemple proponas al la kunlaborantoj nur 1,5 procentojn pli da salajro, sed por validecperiodo de naŭ monatoj. Tio estas do malpli multe ol la metallaboristoj ricevis.

Kunlaborantoj en sindikatoj ne havas mem ilin reprezentantan sindikaton. La konvencioj estas pritraktataj kun la konsilantoj de la laborprenantoj, kiuj ne rajtas voki al striko.

Mi komprenas, ke ili obeas por ne riski la laborlokon. Kiu entrepreno ŝatus dungi iaman sindikatoficiston?

Estonte la sindikatoj certe estos devigataj uzi alian metodon, ĉar ĉiam pli sindikatanoj eksmembrigas.

Komentario

Sendube sindikatoj estas gravaj. Ili estas aperaĵo el la industria epoko kiel instrumento por la memhelpo de socie malfortaj grupoj. Per solidareco efektigis reciprokajn helpojn. (Daŭrigo paĝo 7)

Legendo de la Viena Arbaro

(dediĉe al mia frateca amiko Roland Grandière)

de Petro JAYER

Kiel mi tion skribis en 'SAT-Amikaro', nia bedaŭrata k-do Rolando Grandière (mortis dum Marto 1998) troviĝis kun mi en Aŭstrio en la jaroj 1943-1945 kiel deviga laboristo (S.T.O.). El la multaj aventuroj, kiujn ni kune travivis, mi elektas tiun ĉi, ĉar ĝi lasis en niaj koroj neforgeseblajn impresojn. Rolando, kiu kutimis ekskursi kaj kampadi kun siaj gepatroj, tre ŝatis la naturon. Kaj oni scias, ke Aŭstrio estas paradizo por la naturamantoj: montoj, arbaroj, lagoj, de la ĉeĥa kaj la jugoslava landlimo ĝis la itala Tirolo, proponas mirindajn ekskurso-celojn. Spite la malfacilajn cirkonstancojn, Rolando kaj du aŭ tri laborkamaradoj kaptis ĉiujn okazojn por profiti de tiu senpaga plezuro trakuri grandiozajn pejzaĝojn kaj spiri aeron, kiu iom forgesigis momente la teruran militon kaj la neelteneblan subpremon de la nazia reĝimo. Mi, kiu loĝis en Vieno, estis plej ofte invitata partopreni kaj Rolando ttransdonis al mi sian amon al la naturo. Tiu sento multe helpis min, kiam mi estis ĵetita en karcerojn de la Gestapo (sekreta nazi-policio. Red.): mi tie revivis la gajajn tagojn kun la ĉiama espero, ke mi iam rekomencos vagadi libere tra la kampoj kaj sur la montoj. Tiu sento multe helpis min, kiam mi estis ĵetita en karcerojn de la Gestapo (sekreta nazipolicio - red.): mi tie

revivis la gajajn tagojn kun la ĉiama espero, ke mi iam rekomencos vagadi libere tra la kampoj kaj sur la montoj.

En Mauthausen (nazi-koncentrejo en Aŭstrio - red.), admirante la apudan Danubion, mi ankaŭ multfoje dankis al la naturo esti ĉirkaŭ mi, konsolante min per sia beleco de la infero, kiun mi travivis.

Nia grupeto ŝatis tute aparte la ekskursojn al la apudaj montoj de suda Aŭstrio, ĉar, grimpane sur la ŝtonplenaj vojetoj, ni ofte salutis Aŭstrojn - ĝenerale mezaĝulojn, ĉar la plej junaj estis soldatoj ĉe la fronto. Tiuj gepromenantoj estis vestitaj per la originale tipa tirola kostumo multkolora, kun ledaj pantalonoj, kaj, por la virinoj, buntaj jupoj kaj korsajoj; ĉiuj kun verdaj ĉapeloj kun plumo de birdo. Ĉiam ili salutis nin per du vortoj, kiuj estis en tiu epoko la malpermesita saluto de la iama Libera Naturamika Asocio, germanlingve esprimita 'Berg frei' (monto libera). Tiuj du vortoj reciproke ĵetitaj estis verdire pli ol simpla saluto, sed konfirmo de ribelado kontraŭ la nazia reĝimo, de libero simbolita per tiuj vagadoj meze de la libera naturo.

Dum la bela printempo de 1944 kiam plene furiozis la milito tra tuta Eŭropo, Rolando proponis, okaze de la tritagaj pentekostaj ferioj, vojaĝi al montaro

(Daŭrigo paĝo 7)



(Daŭrigo de paĝo 6)

Rax en la regiono de Graz (Sud-Aŭstrio), kie ni certe trovos iun rifuĝejon por tranokti. Mi devos prizorgi la trajnbiletan. Du semajnojn antaŭe mi iris al la stacidomo kaj senprobleme ricevis ir- kaj revenan vojaĝbiletojn, sed apenaŭ forlasinte la giĉeton mi estis alparolata de du viroj, kiuj, kvankam civile vestitaj, laŭ sia sinteno videble apartenis al la sekreta polico GESTAPO. Ĉar mi bone komprenis la germana lingvon, mi devis montri al ili miajn biletojn, kiujn ili forprenis klarigante al mi, ke laŭ la multnombraj afiŝoj, ĉie videblaj, la 'radioj devas roli por la venko' civila popolano ne rajtas uzi vagonojn sen absolute necesaj motivoj.

(Pro spacomanko daŭrigo en KUNE 8)



(Daŭrigo de paĝo 5 - Kokobataloj)

Ĉar neniu homo estas anĝelo, sed ĉiam serĉante plibonigi sian vivsituation, atingi potencon, influon, gloron kaj honorigon, homoj suriras vojojn, kiuj ne ĉiam meritas la etiketon de humanismo. 'Mono estas potenco!' Fortaj sindikatoj povas atingi rezultojn, ke la depende laborantaj homoj vivas sufiĉe bone. Sindikataj oficiuloj kaj membroj bezonas mondvasse komunan lingvon por interkompreno kaj interŝanĝo de spertoj pri la taga vivo. Facile lernebla monda lingvo ja ekzistas: ESPERANTO! Sed bedaŭrinde sindikatoj ĝis nun ne montras pretecon, akcepti mondlingvon, ili preferas la anglan, la francan kto. Kaj tiele ili estas demandataj. AFS

LEA/G - ofertas!

'Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado' (Esperanto-germana-deutsch)
Broŝuro, DIN A 5, 116 paĝoj.
Eldonanto: Fritz-Hüser-Institut
Ellaboris i.a. Prof.Dr.R.Noltenius,
Detlev Blanke, Jiri Proskovec,
Dr.Ulrich Lins, A.F.Stephan.
Favorprezo inkl.sendokostoj: 6,- gmk.

8 ilustritaj poŝtkartoj pri la kultura historio de la Esperanta movado, en kovraĵo - prezo 4,- gmk. inkl.sendkost.

Ĉio havebla (tiel longe kiel disponeblaj) ĉe
A.F.Stephan, Renchener Str.47,
DE-77704 Oberkirch (Baden)
Fakso: 07802 - 90 336
Konto 0740902 Deutsche Bank
Oberkirch (BLZ 664 700 35)
(per via senpera pago vi povos mendi!)

La ĉi-jara berlina Paska Marŝo sub la signo de la balkana milito

Naciismo estas merdo!

de Gary Mickle

La berlinan porpacan Paskan Marŝon partoprenis ĉi-jare inter 8000 kaj 12 000 homoj, multe pli ol dum la pasintaj kelkaj jaroj. La tuta evento neeviteble rilatis al la nun okazanta milito pro Kosovo. La partoprenantoj marŝis en tri blokoj: unu de la *Berlina Packunordigo* (la organizinta grupo), unu de la jugoslavoj (ekipitaj per naciaj flagoj, ŝildoj kun patriotisma enhavo, celtabulaj ŝildetoj sur la brusto), kaj unu de «ĉiuj aliaj», inter kiuj troviĝis ankaŭ kelkaj berlinaj esperantistoj. Ĉiuj grupoj tre unusece kondamnis la militaran agadon de NATO.

Jam antaŭ dek monatoj Will Firth (Volo) antaŭvidis en teksto pri la Kosovo-problemo [eltiraĵoj tradukitaj de la red.] la nunan evoluon de eventoj kaj proponis agadvojon, por kiu nun estas tro malfrue:

Ne al la serba rasapartiga reĝimo, ne al la NATO-militarismo

«La NATO, inkluzive la germanajn armeajn fortojn, volonte enmiksus sin en la Kosovo-konflikton por haltigi la kampanjon de serbaj militistoj kaj duonmilitaraj fortoj kontraŭ la alban-etnaj civila loĝantaro kaj milicoj, kaj por malhelpi abomenaĵojn kontraŭ la civila loĝantaro en tiu parto de eks-Jugoslavio. Laŭvorte komprenite, tio estas nobla celo. Sed estas klare, ke la plimulto de preparolantoj de tia sinenmikso ploras krokodilajn larmojn. Ĉar kie estis la tiom homamika NATO okaze de la murdado en Ĉeĉenio? Kie ĝi estas okaze de la mortigado kaj masiva atencado de t.n. homaj rajtoj en la (turka) Kurdio? Kial eksterteritoria misio tiel gravas, ke la generaloj kaj altaj politikistoj de la «okcidento» volas agi eĉ sen la figfolio de UNO-mandato?»

«Ni devas malakcepti kaj la serban reĝimon de rasapartigo kaj la NATO-militarismon kiel hommalestimajn potenccrimojn. Ĉefan rangon devas havi ĉe niaj agadoj la efika kunlaborado kun laboristoj, fuĝintoj kaj progresivaj organizaĵoj de la bazo en kaj el la iama Jugoslavio. Sindikatoj kaj laboristaj grupoj en Serbio, homrajtaj grupoj en Kosovo kaj pacgrupoj ĉie ajn bezonas nian kunlaboron.»

Nun la infano falis en la puton. Ankaŭ la maldekstro ne disponas solvon. Bezonata estas (aŭ baldaŭ estos) miaopinie debato pri la tuta temkomplekso de naciismo, patriotismo, la

Specife atakataj estis: NATO, Clinton, Schröder kaj SPD, Fischer kaj Alianco 90/Verduloj. Kritiko apenaŭ trafis la serban-jugoslavan naciismon, kio tamen ne plaĉis al ĉiuj.

La maldekstro havos nenion por fieri, dum ĝi ankoraŭ debatas pri tio, ĉu Clinton ĉu Milošević estas la ĉefkanajlo. Konstati, ke la NATO-bombojetoj estas hipokritaĵo kaj krome sentaŭga rimedo por atingi la deklaritan celon estas kaj necesa kaj pli ol facila, sed proponi konvinkan solvon fakte ne eblas nun.

obsedo pri etneco, glorigo de etna identeco: debato pri tio, ĉu ataki sporade la rektajn krimojn de naciismo, ĉu ataki daŭre la naciemon kaj ĝiajn ideajn fundamentojn.

Unu rigardo en *soc.culture.esperanto* (la interretan novaĵgrupon) sufiĉas por konvinkiĝi, ke la esperantistoj apartenas al la ariergarduloj en demandoj de paco kaj milito. Ankaŭ la esperantistoj dividiĝas laŭnacie (rusoj kontraŭ okcidentlandanoj) en 1999 kiel en 1914, kiel la cetera mondsocio, al kiu ili apartenas. La alvoko de Hector Hodler, nun disvastigata de Henri Masson (SAT-Amikaro), ne estas patosa deklaro de memkompreneblaĵoj, sed necesa atentigo.

Tuj post la komenco de la militagado de NATO, Henri Masson, aktivulo de SAT-Amikaro, disvastigis ĉi tiun tekston de Hector Hodler sub la titolo Ĉiam valida alvoko... interrete. Li skribas klarige: «Komence de la unua mondmilito, Hector Hodler, filo de la fama pentristo Ferdinand Hodler, lanĉis alvokon kiu plue validas en la nunaj cirkonstancoj. Ĝi meritas tradukon en ĉiujn lingvojn kaj laŭeble plej vastan diskonigon en amasinformiloj kaj en lernejoj.»

Super

Ni havas la devon ne forgesi... Flanke de niaj simpatioj, ni havas devojn kiujn al ni trudas nia esperantisteco... devo kredi, ke neniu popolo havas la monopolon de la civilizeco, de la kulturo aŭ de la humaneco... Devo kredi, ke neniu popolo entute havas la monopolon de la barbareco, perfideco aŭ stulteco... Devo konservi prudenton eĉ meze de la premigaj influoj de la popolamasoj... La parolo estas nun al la kanono, sed ne eterne daŭros ĝia blekado. Kiam centmiloj da homoj kuŝos en la batalomboj kaj la ruinoj ĉe la venkintoj kaj venkitoj atestos pri la teknikaj pli ol pri la moralaj progresoj de nia civilizeco, tiam oni alvenos al iu solvo, kaj tiam, malgraŭ ĉio, la internaciaj rilatoj denove ligoĝos, ĉar super la nacioj estas tamen io... Se sur la nunaj ruinoj ni volas konstrui novan domon, oni bezonos tiujn laboristojn, kiujn ne timigos la malfacilaĵoj de la rekonstruo. Ni esperantistoj, estu la embrio de tiuj elitoj. Por inde plenumi nian taskon, ni konservu nian idealon kaj ne lasu nin subpremi de la malespero aŭ de la bedaŭro.

Hector Hodler en *La Esperantisto* de la 5a de januaro 1915

Ĉe la paska marŝo kvarono ĝis triono el la 10 000-12 000-homa partoprenantaro estis naciistoj – serbaj-jugoslavaj, ankaŭ kelkaj grekaj, se juĝi laŭ la flagoj. Kie estis la batalantaj kontraŭnaciistoj? Pli ol kun iu ajn alia tendenco, kiu sin esprimis ĉe la manifestacio, mi povis konsenti kun tiu, kiu elvokis laŭparolile, ke naciistoj (la priskribitaj) ne devus havi lokon en pacmanifestacio kaj atentigis pri unu de la partoprenantoj neglektata vero: «Naciismo estas merdo!» (Vidu sur paĝo 10 la protestleteron de kelkaj membroj de Maldekstra Forumo)

Nun estas tro frue por antaŭdiri, ĉu post ĉiuj balkanaj militoj ni vidos pli da sagaco ĉe esperantistoj rilate demandojn

de naciismo/etneco. Malpli ofte la tedajn regurdaĵojn pri la «bona patriotismo» kontrastigata kun la «malbona naciismo», pli ofte kritikan rigardon al la religieca glorigado de etneco kaj etna identeco, kiu oftas ĝuste ĉe esperantistoj. La kulto de etna identeco mem estas parto de la problemo, moderna varianto de tiu naciismo, pri kiu Lanti diris, ke ĝi estas la vera religio de nia jarcento. Kulto, kiu sub malfavoraj sociopolitikaj kondiĉoj eniras alojn kun viktimitismo, ŝovinismo ktp.

Ŝajnas, ke ne alfalas al la esperantistoj la gvida rolo, kiun aludis Hodler. Ankaŭ en ilia stalo estas multe da merdo por forporti.

letero de 1999 04 18 sendita de kvin membroj de la **Maldekstra Forumo** al la **Berliner Friedenskoordination** [trad. de la red.]

Ni partoprenis la Paskan Marŝon lunde la 04 05 kaj kun malkomforto konstatis la partoprenon de jugoslaviaj naciistoj. Pri tio ni ŝatus demandi: Kion la Packunordigo volas fari por estonte malebligi aŭ almenaŭ laŭpove malagrablighi al tiaj naciistoj la partoprenon? Ni celas per tio homojn, kiuj laŭ la impreso, kiun peras ŝildoj kaj flagoj, estas «bonaj patriotoj», do kontraŭuloj de la NATO-atako, tial ke la NATO-alianco atakas ilian «patrujon», sed ne nepre, almenaŭ ne videble, estas kontraŭuloj de la pogromecaj buĉadoj, kiujn la diktatoreca reĝimo en la amata «patrujo» nuntempe plenumas kontraŭ la nacia malplimulto de kosovaj albanoj.

Ni konsideras la ankaŭ la jenan demandon ne polemike tropintigita: Ĉu ni devas anime prepariĝi je kunmarŝado en konfidema komuneco kun germanaj naciistoj de grupoj kiel NPD aŭ DVU [ekstremdekstraj partioj; red.], se tiuj transiros al la flanko de la NATO-kontraŭuloj (eventuale ĉar ili preferos pure germanajn militarajn celojn al la NATO-celoj)? Tiaj grupoj povas ĉiukaze aserti, ke la etna purigo, kiun ili intencas fari en Germanio, okazu sen sangoverŝado.

Ni tamen volas agnoski rilate al la Packunordigo, ke la eventoj de la pasintaj tagoj preterrapidis, certe pli rapide, ol ke heterogena agadalianco povis adekvate reagi al ili. Sed ni esperas, ke okaze de estontaj agadoj pro la balkana milito kaj pacmanifestacioj oni entreprenos konkretajn agojn (taŭgaj parolkontribuoj, sloganbendoj ktp.) por izoli naciisme sin aperigantajn subtenantojn de ŝtatoj, kiuj faras etnajn militojn, se laŭ la situacio ilia partopreno estas atendebla. Alie la pacfortoj – eble pro avido je imponaj partoprenciferoj ĉe agadoj – kondutas hipokrite, simile al la NATO-ŝtatoj, kiuj laŭ sia taktika kalkulo kondamnas, subtenas aŭ ignoras etnajn purigojn. Krome ili atestas sian nekapablon orientiĝi en nove estiĝantaj situacioj, se ili malmulte atentis la pliigon de militaj konfliktoj bazitaj sur naciismo kaj sur diigo de la etna identeco.

Heroldo pri la milito: el Heroldo komunikas (006), interreta servo por redakcioj, «novajagentejo de la establoj aliĝintaj al la Pakto por la Esperanta Civito.»

La lasta numero de *HdE* (4/5, 20 apr 99) dediĉas tutan paĝon al la diversaj reagoj tuj post la unuaj atakoj de NATO kontraŭ Jugoslavio. La komentarioj devenas el retroŝtaj interŝanĝoj. Kelkaj esprimas drastan kondamnon pri NATO, sen ajna mencio pri la respondecoj de Jugoslavio, konsekvence ili implice aŭ eĉ eksplicite favoras la politikon de Serbio: temas pri tieaj fakaj kaj regionaj E-asocioj, inkluzive de du landaj asocioj de UEA kaj de la landa sekcio de TEJO; pri Renato Corsetti, vicprezidanto de UEA; pri unuopuloj, ne nur serbaj, ekzemple la konata TEJO-aktivulo Francesco Amerio; kaj pri la grupo EUOKKA-Vinilkosmo. Ne nur kontraŭ NATO, sed same aŭ eĉ pli draste kontraŭ Belgrado sin esprimas Franko Luin, gvidanto de Sveda E-Federacio; Andrés Turrisi, gvidanto de la venezuela esp-istaro; Daniele Vitali, prezidanto de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj; kaj Henri Masson, ĝenerala sekretario de SAT-Amikaro. Giorgio Silfer (vicprezidanto de Esperanta PEN) komentarias super la partioj: "La nuna balkana milito evidentiĝas, miaopinie, kvin problemojn: 1) estas en krizo la procezo de formado de la 'Granda Eŭropo'; 2) pri etnaj konfliktoj du tezoj kolizias: integriĝo aŭ teritoria apartismo; 3) (ri)fugantoj estas nova socia komponanto, baldaŭ same grava kiel la gastlaboristoj; 4) la politikaj kaj armeaj ekvilibroj inter Eŭropo kaj Usono estas reviziendaj; 5) malsufiĉas la informado pri la reala stato de la sekureco en Eŭropo. Tiuj problemoj (precipe la dua kaj tria) envolvigas kaj dividas eĉ la esperantistaron."

Pensio por demisiinta ministro

La iama germana financministro el tiu ofico havas rajton al transira asignaĵo kaj ankaŭ al jara pensio de 188000,- gmk., kiel la ligo por impostpagantoj en la urbo Wiesbaden konfirmis al la gazetaro.

Kiel referento de la ligo deklaris, ricevas la demisiinta ministro asignaĵon de ĉ. 119000 gmk.

Detale kalkulas la rajton jene:

Salajro de tri monatoj kiel ministro estas 23650 gmk. monate, sekvas tri monatoj dum kiuj la federacia respubliko devos elspezi po monato 11824 gmk. al eksa ministro. Krome li ricevos sian pensionon kiel eksĉefministro de federacia lando.

Ek de la sepa monato post la demisio eksministro rajtas ricevi pensionon kiel ministro. Sed li ne ricevos pensionon por sia aktiveco kiel parlamentano, kiam la laboraŭro estus tro mallonga.

La supre menciitaj sumoj povas diferencigi laŭ la funkcio de la ekŝiĝinto.

(el: *Badische Presse* - kompilis AFS)

Kompensajo

Antaŭ jaroj mi aŭdis pri sumo, kiun entrepreno devis pagi al 'eliminta' direktoro: 3,5 milionojn gmk.

Ĉar la entrepreno kontraktis kun la estro kvin jarojn, ĝi devis salajri ankaŭ la jarojn dum kiuj la estro ne plu rajtis 'majstri' la negociojn.

Tuj post forlaso de la entrepreno li komencis laboron kiel estro de firmao

en Berlino (jarsalajro: pli ol unu miliono!). Ĝi salutis ke denaska usonano intencis estri la entreprenon laŭ usonanaĵ metodoj.

Malsato

Oni ofte povas legi en gazetoj, ke infanoj en la tria mondo suferas pro malsato. Ni esperu, ke burĝoj havante superfluan kapitalon, donacas al la Monda Malsatohelpo. Krome ni esperu, ke la mono atingos la malsatajn infanojn.

'Ankoraŭ' ekzistas idealistoj, kiuj ne nur donacas eble laŭpovan kontribuon, sed ankaŭ sen salajro aktivas por la ideo de Esperanto!

AFS

anonco

Intence starigi kunlaboron, kun ravego mi informas al vi pri niaj varoj jene:

- virina vestaĵo, littuko, tablotuko kun tabla buŝtuko kaj naztuko – ili estas broditaj mane,

- aliaj aĵoj kiel ĉapeloj el pajlo, sisalo kaj rafio, kunporteblaj ĉe marbordo.

Notindas, ke nia entrepreno estas la ununura, kiu oficiale uzas Esperanton kiel laborlingvon enlande.

Via subteno estas necesa el multflankaj aspektoj. Pliaj demandoj estos bonvenaj kaj mi estos je via dispono kiam ajn.

Roger RASOLOFO
ETABLISSEMENT SANDRATRA
Lot I-A 106 Tanjombato
Antananarivo, Madagaskaro
(telefono: 22 468 20)

Vivu la ... Vivu la ... Vivu la stel'?

de Tobias Meißner

En n-ro 25, p. 20, s-ano GUNTHER prave plendas pri la agresema aspekto de la Esperanto-stelo. Sed ne nur laŭ artistaj/homaj kialoj kritikindas nia nuna simbolo, ankaŭ laŭ praktikaj bezonoj.

Unuflanke: La kvinpinta stelo estas tro ofte uzata: Kiel sorĉista simbolo, kiel ŝtata simbolo (ekz. videbla sur la tankoj kaj milit-aviadiloj de la usona resp. eks-sovetunia armeoj); la homo ĝin taksas kiel uson-ŝerifan/komunisman/socialisman/MAOisman/TROCKIisman/...isman simbolon; ekz. dum la kontraŭ-iraka milito oni ja vidis verdajn stelojn kvinpintajn en la flago de tiu lando; kaj eĉ usona oleo-entrepreno ktp. uzas kvinpintan stelon, kvankam ne verdan. Jam ekigante la uzadon de tiuspeca stelo por simboliĝi Esperanton oni sentis tiun malhelpon kaj aldonis la vorton «ESPERANTO»; el ĝi restis finfine la «E».

Aliflanke: La stelo ne havas rilaton al Esperanto, ne indikas iun enhavon. Do, bone, se oni klarigis al iu homo, ke la kvin pintoj estas la kvin kontinentoj (resp. la enloĝantoj), kiuj renkontas sin en la mezo, do «Esperantujo», tiam tiu homo diros «aha» kaj rekonas la simbolan enhavon. Ĉu vere estas bona simbolo, se oni devas ĝin klarigi?

Kiom granda estas la deziro en la Esperantistaro, havi alian simbolon, montras la ofta uzado de la UEA-jubilea (1), kvankam tiu eĉ estas multe pli maltaŭga ol la stelo: Kiu taksas la grafik-ajojn kiel literojn, vidas iun cirilan kaj latinan literojn «E», do verŝajne temas pri iu rus-germana komuna entrepreno. Kaj kiu ĝin taksas kiel nuran grafikajon,

vidas du manojn, kiuj sinkroĉas en la mondglobon, do enkasigas la mondon.


Tiom da kritiko – sed kie la solvoj? Jam antaŭ jaroj mi kreis stelon rondan (2). Sed ankaŭ ĝi ne estas solvo, eĉ ne kontentiga; restas la problemo trovi simbolon kiu transportas la enhavon de Esperanto.

Jen la postuloj al nova simbolo: Enhave ĝi devas aludi al «forigo de limoj», «interkomunikado», «egalrajtigo», «interŝanĝo de kulturoj, vivmanieroj», «kunligi homojn», «unuigi la mondon/la homaron»; ĝi devas montri ke temas pri retigo (kontraste al la hierarĥaj strukturoj de la imperialisma «globaliĝo»), ke estas libervola kunagado de unuopaj homoj/homgrupoj. Tekniko ĝi devas esti facile desegnebla, bonaspekti eĉ post reprodukto per antikvaj kopiiloj, taŭgi kaj en nigre/blanka kaj multkolora reproduktoj.

Bedaŭrinde mi povas oferti nek solvon, nek homon kiu kapablu trovi solvon. Mi nur unu simbolon vidis, kiu laŭnivele estas absolute taŭga: estas de la Evangelia Eklezio Berlino/Brandenburgio (3). Komparante kun la supre menciitaj kriterioj rekoneblas, ke tiu kristan-eklezia simbolo estas kreita de geniulo. Rilate al Esperanto ĝenus la ortanguleco – sed ĝi ja estas kreita por kristana organizo, tie la baza simbolo estas kruco, do estus eraro havi iun ne-ortangulan.

Postrimarke: Foje mi aŭdis kritikon, ke la «E» en la stelo estas latina litero, kio estus kontraŭ la neŭtraleco/egalrajteco. Nu, E-o estas skribita per principe latinaj literoj. Sed pripensante aliajn ideojn mi demandis la amikojn de

ILERA, kaj ili pravigis mian supozon ke (se tiuj konas la literon «e») la litero e estas unu punkto; do eble jen (4).



Ĝenerala Konsilantaro de SAT

La redakcio ricevis helpopeton de k-do Pelle Persson, sekretario en la Konflikt-komisiono de SAT (kaj ankaŭ grava aganto de SLEA – la sveda LEA), kies tasko estas ankaŭ funkciigi la Ĝeneralan Konsilantaron de SAT.

Malgraŭ diversaj alvokoj inter la SAT-anaro por peti SAT-membrojn alpreni ĜK-taskojn de kategorio A, sin trovas ĝis nun kandidatoj nur por horzono 0 kaj horzono 8. Mankas do kandidatoj por horzono 1 (en kiu situas i.a. la germanlingvaj regionoj) kaj multaj aliaj.

Kiu leganto de la *Magazino* estas membro de SAT kaj interesiĝas pri ĉi tiu tasko? SAT pro sia historia evoluo tre forte koncentras sin en Francio, tute aparte en la urbo Parizo, kiu estas la sidejo de la Asocio kaj ĝia Plenum-Komitato. La Ĝenerala Konsilantaro celas kontraŭpezi tiun centralismon kaj speguli la sennacian karakteron de SAT. Sinproponojn, demandojn ktp. bonvolu direkti al k-do Pelle Persson, Svartviksvägen 14, SE-12352 Farsta (Svedio); interrete ĉe persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com

eltiraĵo el la statuto de SAT:

Ĝenerala Konsilantaro

15. La Ĝ.K.-aro konsistas el **A**) unu membro k unu anstataŭanto el ĉiu geografia sektoro, elektataj per referendumo samtempe kun la P.K. [Plenum-Komitato: *red.*], **B**) Konflikt-Komisiono, **C**) unu reprezentanto de la membraro el la urbo en kiu sidas la P.K., **Ĉ**) unu reprezentanto de ĉiu L.E.A. konvencie ligita kun SAT, **D**) unu membro de ĉiu fako (Administracio, Literatura Sekcio, ktp.) funkcia ekster la sideja urbo de SAT. La sekretario de la K.K. estas ankaŭ sekretario de la Ĝ.K.-aro k funkciigas tiun organon. Ĉiu konsilanto estas elektata de la tuta anaro.

16. La Ĝ.K.-aro helpas al P.K. per siaj informoj kaj konsiloj. Ĝi plie observas k kontrolas la agadon de la P.K. – Se la Ĝ.K.-aro rimarkas, ke tiu agado ne estas honesta k laŭstatuta, ĝi rajtas konigi siajn konstatojn al la tuta membraro per la presorgano. La Ĝ.K.-aro prezentas raporton antaŭ ĉiu Kongreso. Ĝi rajtas demandi al la P.K. pri ĉiuj aferoj k postuli respondon.

Ni raportis en *Magazino 25*: «La *jurnalo Contraste* («*Die Monatszeitung für Selbstorganisation*»), dediĉita al demandoj de memhelpo kaj kooperativismo, aperigis en sia numero de 1998 decembro artikolon de Ricarda Buch, kiu reprezentis la germanajn interŝanĝorondojn (*Tauschringe*), pri la internacia renkontiĝo de SIL (sistemoj de interŝanĝoj lokaj) organizita de francaj esperantistoj proksime al Montpellier fine de julio. La renkontiĝo ebligis laŭ la konstato de la aŭtorino al la esperantistoj pli informiĝi pri la celoj de la movado de nemonaj interŝanĝoj, kaj al tiuj lastaj konatiĝi kun la celoj de la esperantistoj. [...]» Tia interkonatiĝo de esperantistoj kaj neesperantistoj en ia ajn kadro de soci-alternativa agado – kaj la posteventaj pripensoj pri ĝi sur la neesperantista flanko – devus interesi la membraron de LEA/G. Pro spacomanko ni limigas la pritrakton al tiuj «*Esperantaj*» aspektoj. Jen kelkaj citaĵoj el la artikolo de Ricarda Buch: *SEL, das Salz im Getriebe*:

Ricarda Buch en Contraste pri SIL-renkontiĝo kaj Esperanto

La organizintoj de la renkontiĝo apartenis unuflanke al la monda komunumo de esperantistoj, al kiu kalkuliĝas proksimume 7000 membroj [??: red.], sed aliflanke ankaŭ al la sudfrancaj SIL. Hazarde troviĝas en la suda Francio multnombraj SIL-aktivistoj, kiuj samtempe parolas Esperanton, kaj hazarde okazis ankaŭ en Montpellier la ĉi-jara tutmonda Esperanto-renkontiĝo tuj post la internacia SIL-kongreso. Do la kongreso de la SIL estis karakterizita de kunfluo de la celoj disvastigi la universon lingvon Esperanto kaj samtempe efektiviĝi interŝanĝon pri la evoluo de la SIL-movado. Ĉiu parolkontribuo estis interpretita en Esperanton, kio ĉe neesperantistoj parte estigis malemon. Aliflanke, la kongreso proponis la eblecon konatiĝi homojn el aliaj kulturondoj, nur-esperantistojn, kun la ideoj de la SIL-movado, dum la SIL-agantoj siaflanke povis informiĝi pri la celoj kaj valorokomprenoj de la esperantistoj.

Ĝuste en la pireneoj, en la landlima teritorio inter Francio, Hispanio kaj Eŭskio, Esperanto estas disvastigita. *Claude*

Fressonet, la prezidanto de *SILKA Esperanto* apartenas kune kun *François Terris* al la fondintoj de la unua franca SIL – la *SEL Pyrénées*, envivigita en 1994 en Ariège. Por esperantlingvaj vojaĝantoj, kiuj volas kontaktiĝi kun la loka loĝantaro en la sudfrancaj pireneoj, estas facile. Ilin la tiea Esperanto-komunumo amike akceptas kaj «*pludonas*». Krom la persona identeco de SIL-agantoj kaj esperantistoj, estis ankaŭ enhavaj interkongruoj [...]

Kvankam la neesperantistoj bonvoleme rigardis tiun proponon [enkonduki Esperanton flanke de la angla kaj la landa lingvo ĉe internaciaj kontaktoj de la SIL: red.], aliflanke multaj el la SIL-agantoj tamen sentis sin tropripostulitaj per tio, ke ili nepre nun devu lerni Esperanton. Finfine estis reprezentitaj el ilia scenejo nur tri eŭropaj landoj, kaj interkompreniĝo per la franca estis ebla.

Bedaŭrinde mi apenaŭ povis interkompreniĝi kun la partoprenantino el Japanio, ĉar mi ne parolas Esperanton. Sed mi kaptis la fakton, ke ekzistas en

Japanio ofertoj kompareblaj kun niaj senioraj kooperativoj: Laŭ tempa kalkulbazo oni tie ofertas privatajn helpservojn por pliaĝaj gecivitanoj kaj homoj kun handikapo. Tiujn laborservojn la plenumantoj povas ŝpare kolekti dum longa tempoperiodo, post kiu ili mem

rajtas pretendi ilin. Mi esperas iam raporti pli pri tio en *Contraste*.

La renkontiĝo en suda Francio tre plaĉis al mi. Ĝi proponis la eblecon, formi amikecojn kaj peris unuafoje enrigardon en la scenejon de la francaj SIL, kiu tre multe similas al nia. (GM)

Izraelio: la bredado laŭ la ritmo de la Sankta Skribo

de **Maryvonne Robineau**

Por ke la bibliaj leĝoj kongruu kun la bredado, la religiaj kibucoj montriĝas elturniĝemaj.

Vendrede vespere ĉe la kibuco Ein Zurim, ĉiuj klopodas por digne akcepti la ŝabaton: oni alivestiĝas, la domoj estas puregaj, oni fumas la lastan cigaredon, oni programas la horloĝojn kiuj ekfunkciigos la elektron, la virinoj akurate finkuiras la kukojn por la semajnfino. Jen aperas la ŝabata stelo: neniu laboro ĝis paso de 24 horoj. Nek kuiri, nek skribi, nek lavi, nek fumi, nek telefoni, nek vojaĝi, nek ekbruligi fajron aŭ ŝalti la lumon.

Ein Zurim estas unu el la dek-ses religiaj kibucoj en Izraelio kaj, ĉirkaŭataj de siaj ses infanoj, Esther kaj Schmulick akceptas nin en sia hejmo. Antaŭ ol iri al la manĝosalono komuna al la tuta kibuco, Esther antaŭzorgas doni al mi fulardon por ŝirmi miajn harojn kaj Bruno kapvestas sin per kipo, la judara ĉapeto. "Por ne ŝoki iujn personojn" ŝi precizigas. Post la vespermanĝo, niaj gastigantoj montras al ni kiel meti la vazaron en la lavkuvojn disigante tiujn kiuj entenis viandon disde tiuj en kiuj estis servitaj la fromaĝoj. Efektive la

juda tablo apartigas la karnajn manĝojn de tiuj kiuj konsistas el laktaĵoj, starigante inter ili limon laŭ la jena principo: "Ci ne kuiras la kapridon en la lakto de ĝia patrino" (Eliro 23-19).



En urbo, la ortodoksaj judoj montriĝas en sia tradicia vestaro

Tiel, la tutan vivon de la enloĝantoj de Ein Zurim reguligas la bibliaj instruoj. "Ni kredas ke ĉio estis skribita de la rabenoj en la Talmudo kaj ni devas observi ĝiajn leĝojn se ni volas vivi kiel judoj obeantaj Dion" klarigas Schmulick. Publikigita en jaro 999 a.K. en la religiaj akademioj el Babilono, la Talmudo regas ĉiujn aspektojn de la ĉiutaga vivo. Tiel same ĝi traktas filozofion, kiel la edukadon de l'infanoj.

Luj izraelianoj riproĉas al la religiuloj, ke ĉi tiuj same vivas kiel antaŭ dumil jaroj. Unuavide, fondita en 1946, la kibuco Ein Zurim kun sia moderna uzino, siaj hangaroj ŝirmantaj agrokulturan materialon ultraperfektigitan kaj siaj agrablaj dometoj ĉirkaŭataj de ĝardenoj, neniel aspektas kiel vilaĝo el la biblia epoko. Ĉirkaŭ kvincent personoj venintaj de dudek-kvin landoj komune vivas tie, egalece dividante siajn havaĵojn kaj la fruktojn de sia laboro.

Sed ne ĉiam estas facile kombini la leĝojn de la Talmudo kun la postuloj de la moderna ekonomia vivo. Tiele la ŝabato starigas kelkajn problemojn al la agrokulturistoj. Forpuŝante ĉian ajn zorgon, la homo devas dediĉi tiun tagon al sia Dio, al sia familio, kaj ĉia ajn laboro estas malpermesata. Sed se povas atendi la tero, la bestoj bezonas zorgadon. Kaj la tricent bovinoj de Ein Zurim ne estas escepto, necesas ilin melki kiel kutime, po tri fojojn tage.

"Kompreneble, ni melkas la bovinojn dum la ŝabato ĉar la Talmudo preskribas ne lasi suferi la bestojn, sed tion ni faras laŭ maniero konforma al la Leĝoj." Por la melkado, la agrokulturistoj renkontis problemon pro la fakto, ke al ili estas malpermesate premi ŝaltilon por produkti elektron. Tial ili ekpisis sin per programeblaj horloĝoj kiuj ĝustatempe startigas la melkomaŝinojn kaj aŭtomate haltigas ilin.

"Ĉiujn virseksan unuenaskiton de cia bovino aŭ de cia ŝafino vi dediĉos al cia Dio, Javeo. Ci ne laborigos la unuenaskiton de cia bovino. Ci manĝos ĝin kun ciaz samhejmanoj..." Tiel parolas la libro de la Deuteronomo (15-19) en la Biblio, por sciigi al la homo kiu plugis, semis, kultivis kaj fieras pri sia rikolto ke sen Dio, nenio el tio eblas. Sed ĉiujare en la stalo de Ein Zurim naskiĝas preskaŭ cento da unuenaskitaj bovidoj. Kion fari el ili? La rabenoj trovis solvon: la bovidinoj kiuj naksos sian unuan bovidon en la jaro estas fiktive venditaj al araba najbaro (ĉi tiu ricevas monsumon por efektiviĝi la "negocon"). Ili restas en la kibuca stalo sed ne plu estas submetataj al la talmudaj leĝoj.

La kibucoj

Dum la unua kibuco estis fondita en 1910, ekzistas nuntempe 270 kibucoj nombrantaj de 40 ĝis pli ol 1000 membrojn. 130 000 personoj, nome: 2,6% de la totala enloĝantaro de Izraelio, elektis tiun komunuman vivmanieron.

El ili, nur 16 kibucoj (nome 8000 personoj) estas religiaj kibucoj kiel Ein Zurim, postulante de siaj membroj ortodoksan kultobservon.

"Pesah", la Pasko, estas unu el la gravaj momentoj de la juda vivo, memoriganta la Eliron el Egiptio de la izraelidoj, sub gvidado de Moseo. Tiun semajnon antaŭas intensa purigado de la domo por kontentigi la absolutan postulon de pureco dum la festo. Dum sep tagoj, oni konsumos nur panojn sen gisto, ne fermentitajn, simbolo de la renoviĝo kaj de la liberigo. Ĉar la bestoj devas esti regataj de la samaj reguloj, la melkadejo estas ĝisfunde purigita kaj oni malaperigas ĉiun spuron de tritiko el la nutrado de la bovinoj. "Iom post

iom ni anstataŭigas per maizo, komencante la transiron ĉirkaŭ tri semajnojn antaŭ Pesah kaj grade revenas al la normala nutromaniero. Tiel ŝanĝante la nutradon de la bovinoj ofte okazas malaltigado de la lakto-produktokvanto. El tio ni perdas monon sed tio estas la prezo kiun ni konsentas pagi por vivi

harmonie kun nia kredo" klarigas Schmulick.

Ĝisfunde frontantaj la teknikon kaj la rendimenton, ili tamen neniam forgesas la vivregulojn de siaj praavoj, akordigante spiritan vivon kaj laboron: iliaj tagoj ĉiam komenciĝas kaj finiĝas en la sinagogo.

Por scii pli pri tiu eksterordinara aventuro, unu libro:

Ili vivis sur la tero – Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo

240 paĝoj – 8 paĝoj kun koloraj bildoj

Havebla ĉe UEA aŭ Bruno Robineau – 49270 Landemont – Francio

Tel-Fax 02 40 98 78 76 – E-poŝto: Bruno.Robineau@wanadoo.fr

120 FF + sendokosto: 20 FF por Francio - 30 FF por aliaj landoj

anonco

Sensacio en la Goethe-jaro:

Faŭsto I kaj II en Esperanto

Bona okazo: En la jaro de la 250-a datreveno de la naskiĝo de Johann Wolfgang von Goethe en la "eldonejo mondial" (Berlin) jus aperis ambaŭ partoj de *Faŭsto* en Esperanto.

La tradukon faris Karl Schulze (1910-1983), en kies esperantigo siatempe en GDR jam aperis la romanoj *Nuda inter lupoj* de Bruno Apitz (1974) kaj la *Trigroŝa romano* de Bertolt Brecht (1977), ambaŭ en Edition Leipzig (la lasta kunlaboro kun Bleicher-Verlag Gerlingen).

La manuskripton preparis kaj redaktis por la preso Ulrich Becker. Li ankaŭ verkis kelkpartan enkondukon (El la vivo de Goethe, La literatura kreado de Goethe kaj lia *Faŭsto*, La *Faŭsto* en Esperanto, La tradukinto de *Faŭsto*: Karl Schulze). La eldonajo ankaŭ enhavas ampleksan eseon de la tradukinto (La aventuro de la *Faust*-tradukado). Glosaro ĉe la fino faciligas la komprenon de diversaj aludaĵoj en la teksto.

La libro estas solide broŝurita. La kovrilo prezentas grafikajojn de la uson-hinda artisto Uday K. Dahr.

Ĉiu esperantisto ne hezitu, rapide havigi al si la libron, kiel belegan donacon eĉ en kelkaj ekzempleroj. Ĝi ja estas elstara agrumento pri la kultura valoro de Esperanto! La libro kostas nur 24 germ. markojn kaj haveblas ĉe la libroservoj.

Vi povas vin turni ankau rekte al Mondial-Verlag: Giselastr. 12. 10317 Berlin. (kulturring@snafu.de)

Johann Wolfgang von Goethe: *Faŭsto*. Unua parto de la tragedio kaj Dua parto de la tragedio. El la germana tradukis Karl Schulze. Berlin: eldonejo mondial, 1999, ISBN 3-9805763-4-5, 205 p.

Laboristaj esperantistoj plenigis la kason...

per eldono de pruntedonaĵaj biletoj. Siatempe en la jaro 1922 mono 'suferis' pro malabundeco. Multaj laboristoj kaj oficistoj en Germanio estis sen laboro. (Kiel hodiaŭ!) Ili tamen ne forlasis Esperanton, kiun ili lemis pro la ideo: Per interkomprenilo estonte ne milito denove!

Sed plenumi la taskojn de Esperanto-asocio kostas monon, tiam kaj hodiaŭ. Kiamaniere 'ricevi la monon de aliaj homoj?' La siatempe kasisto de la laborista Esperanto-grupo Düsseldorf, Ludwig Thies (la filo Carl Ludwig T. intertempe atingis 85j. kaj estas fidela LEAG-membro), havis ideon. Kial ne prunti monon de tiuj membroj, kiuj disponas pri mono, kiun ili ne bezonas por la taga vivo? Dirite, farite. Jen kopio de la pruntedona bileto (Darlehnschein):



La bileto montras la sumon de 50 markoj (Reichsmark - regno marko), la tekston tradukite 'Ĉi tiu bileto validas nur interne de la provinco. Post tri monatoj ek de la eldonto la asocio reprenos ĝin enpage.'

Subskribis:

Düsseldorf, la 1-a de Septembro, 1922 - Karl SCHMIDT k. Ludwig THIES*

Laŭ katalogo, kiun Hans Jankowski eldonis, valoras la dokumento - 300,- DM

*L. Thies estas tre konata al ankoraŭ en Düsseldorf vivantaj esperantistoj. Dum jaroj li ankaŭ estis la 1-a prezidanto de la Esperanto-Societo Düsseldorf. Anstataŭis lin post elekto kdo. Hans Pillekamp kies nevino - ŝi scipovas Esperanton - nuntempe estras la ĉefurbon de Nordrejn-Vestfalio Düsseldorf. Post Pillekamp estis A. Stephan la 1-a prezidanto; sekvis Hans Meyer. AFS



SENNACIECA MONO

jam ekzistas ek de la jaro 1946 sub la devizo: Unu Mondo - Unu Monero

Intense esploris Hans Jankowski, Dortmund, fidela LEAG-ano, la historion de *Stelo* kaj *Spesmilo*. Li verkis broŝuron *ESPERANTOMONO* kiu enhavas ekzemplojn pri tiu mono.

KULTURA ESPERANTO-DOMO



'Vera oazo en la dezerto de la lingva konfuzo!'

Kastelo Grésillon - FR-49150 Baugé
Tel. 02.41.89.10.34 CCP Nantes 1485 39 P

La senprofitcela asocio 'Kulturdomo de franclandaj esperantistoj' fond. en 1951, posedas la kastelon Grésillon kun 18 ha. parko. Ĝi organizas aŭ gastigas: kursojn diversgradajn, prelegojn diverssternajn, distrojn diversspecajn k. ekskursojn en belega regiono.

Ĝi disponigas al la staĝanoj kursoĉambrojn, riĉan bibliotekon, riĉan libroservon, salonojn k. butikon. Bedaŭrinde estas la dormoĉambroj en la kastelo momente ne uzeblij pro malpermeso de la ŝtata sekurkomisiono!

Oni atingas la kastelon per trajno (ĝis Le Mans kaj Saumur, de tie per buso ĝis Baugé kie iu de la kastelo atendas vin ĉe la bushaltejo, kiam oni antaŭe informis pri la alvenhoru. Per aŭtomobilo. Baugé situas ĉe la vojkruciĝo de du grandaj vojoj: Angers-Tours (N23-D788) kaj Le Mans-Saumur (N23-D135) De Baugé al la kastelo sekvu la vojon D187 al Le Lude, post 2 KM (dekstre) vi atingos la celon.

La vivo en la Esperanto-domo prezentas kursojn, prelegojn, artlaboradojn k. niraĵojn; ankaŭ distrajn vesperojn kiujn staĝanoj aktive partoprenas. La butikoj estas agrablaj kunvenejoj kie oni povas trinki k. aĉeti memorajojn. Ekskursoj povas okazi laŭ aranĝo de la staĝanoj.

1999 okazos:

de sabato 24-a ĝis sabato 31-a de julio
Lingvistiko: vortaro k. tradukado Danièle Levy
Kantoj kaj gitara muziko de Monika Kimmel
Kursoj por komencantoj Przemek Grzybowski
De dimanĉo 1-a ĝis sabato 7-a de aŭgusto
Kurso pri pekkudrado kun Marie Malézieux
Kurso de Georges Lagrange, kurso de Daniel Moirand k. kurso por komencantoj Grzybowski
De dimanĉo 8-a ĝis sabato 14-a de aŭgusto
Jogo kaj Esperanto - Rose-Marie Laveau
Kurso de Daniel Moirand
De dimanĉo 15-a ĝis sabato 21-a de aŭgusto
Teatro kun Sylvie Bonnet
Kurso meznivela de Christian Rivière
Kurso de Janine Dumoulin - literaturaj tekstoj

Krome: Juanita Turbillon estos disponebla por instruado de 12a - 21a de aŭgusto

Kosto de ĉiu staĝo 180 FFR, aliĝo al Asocio 50 FFR, infanoj sub 16j entute 50 FFR.

Loĝado ekstere en hoteloj, ferioĉambroj privataj, kampadejo.

Informaj haveblaj ĉe:

Paulette Naulet, tel+fakso: 02 41 82 55 22

Jeannine Vincent, 28 bis, rue de Milgavie,

FR-49150 Baugé kaj Marie-Therese Lloancy,

Villa 'La Pergola' 9, rue Baudon, FR-64000 Pau,

tel*fakso 95 59 27 18 88

21-23. majo 1999: SATEB KUNVENO

en Barlaston/Britio. Sur la programo estas 'interkonatiĝo, politika forumo, lingvokliniko, komitatkunveno k.a. Prelegos i.a. Detlev Blanke, Paŭlo Hewitt, Wera Blanke. Pri detaloj bv. demandi (perletere) SATEB (SAT en Britio) 42 Beresford Road, Islington, LONDON N5 2HZ.



AIR MALTA

MALTA ESPERANTO-SOCIETO
anoncas:

*La Sepan Internacian Turisman
Semajnon en Malto
ek de 4-a ĝis 10-a de Septembro 1999*

Antaŭvidata programo: Kulturaj ekskursoj i.a. al la ĉefurbo de Malto, La Valetta, kaj al la malnova ĉefurbo Mdina kaj al Rabat, al la fama pratemplo Hagarqim; al insuleto Gozo ktp. ktp. Sunbanado kaj naĝado en la mediteranea maro;

prelegoj pri la Malta historio k. literaturo kaj pri la loka Esperanto-movado.

Ĝi inkluziva prezo: LM 132 = ĉ. 850 Guldenoj.
Pli da informo havebla ĉe:

Malta Esperanto-Societo, P.O.Box 142
Valetta CMR 01, Malto

Tel: (00358) 486260 Fakso: (00358) 523071
Retadreso: maltaesp a global.net.mt

→ Ni vizitis la insulon en Februaro ĉi-jare kaj kontaktiĝis kun reprezentantoj de la societo. Ni konstatis, ke sur Malto vivas tre ĝentilaj kaj afablaj esperantistoj.

MALTO VALORAS VIZITON!
Ge-Štefanj Oberkirch (Baden)



Atingis nin jenaj periodaĵoj:

S.A.T.-Amikaro (eldonoj Januaro k. Februaro, 1999); SENNACIULO - organo de S.A.T.; LEA-Ligilo; Berlina Informilo (en la ĉefurbo de Germanio okazos la UEA-Kongreso 1999; informoj haveblaj ĉe ESPERANTO-LIGA Berlin
Ina TAUTORAT, Falkstr.25, D-12053 Berlin)

MEZMARA STELO; Malto (12/98)
KORESPONDI - listo pri korespondemuloj mondvasse (havebla kontraŭ du IRK ĉe Raoul MELO, Villa Esperanto, 34, avenue de Russie, FR-03700 Bellerive sur Allier

72-a kongreso de S.A.T.
en Karlovy Vary (Ĉeĥio)
1999-07-24/31

S.A.T.-kongresoj estas ĉiam eksterordinaraj okazaĵoj en amika kunestado. Oni povas kontaktiĝi kun esperantistoj, kiuj venas el 'ĉiu angulo' de la mondo, kiuj uzas Esperanton, ne krokodilas, ne intencas montri per kravato, ke ili apartenas al iu pli alta klaso, kvankam ĉiu rajtas gami sian kolon per bunta dekoracio. S.A.T.-kongresanoj estas simple homoj, kiel tiuj vivas ĉie sur la tergloblo.

PARTOPRENU, gekamaradoj, kaj spertu alian ol kutiman kongreson!
Informojn pri detaloj haveblaj ĉe:
KAVA-PECH, Petro CHRDLÉ
Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice
Fakso: +420.2.9912126

Radio Aŭstria Internacia

Ni disaŭdigas laŭ komisiono de federacia registaro kaj je kostoj de la federacio. Nia redakta sendependeco estas leĝe garantiita. Semajna komentario, raportoj, felietonoj, leterkesto - dimanĉe: 0405, 1405, 2305 UTC. - Nia programo ROI WIEN aŭskultebblas en Eŭropo ankaŭ per satelito ASTRA ADR - 11.141 H (Bayern 3) 8, 10 k. ASTRA ORF DVB-Bouquet 12.892 H, SR 22.000.

Literatura Servo „Espero“, c/o Rolf Beau, Saxoniastraße 35, DE-04451 Althen

PLEJ AKTUALE!

GRANDA VORTARO ESPERANTA- GERMANA

Aŭtoro: Prof. d-ro Erich-Dieter Krause, Leipzig

La germanlingvaj esperantistoj longe atendis tiun momenton! La renoma leksika esperantisto kaj lingvosciencisto profesoro d-ro Erich-Dieter Krause finverkis, post preskaŭ dudekjara intensa laboro, sian Grandan Vortaron Esperantan-Germanan. Lingvistika eldonejo en Hamburgo eldonos tiun kompleksan verkon.

Lia preciza kaj skrupula leksikologia laboro naskis la plej ampleksan iam aperintan vortaron esperantan-germanan. Eĉ regionalismoj kaj lingvouzoj en Aŭstrio kaj Svislando estas konsideritaj en tiu vortaro.

La bindita verko aperos, laŭ sciigo de la eldonejo, en printempo 1999 – do ĝustatempe antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Berlino – kaj ampleksos ĉirkaŭ 900 paĝojn, sur kiuj estas prezentata la kompleta vortstoko de Esperanto inkluzive de amaso da faklingvaj terminoj. La Literatura Servo „Espero“ (Libroservo de la Regiona Asocio Saksio) ĝojas povi jam nun oferti al vi, je subskripcia prezo de 68 DM (germanaj markoj), tiun ĉi vortaron, kiun sendube ĉiu germanlingva esperantisto NEPRE devas posedi!

Ĉi-sube mi mendas _____ ekzemplerojn de la Granda Vortaro Esperanta-Germana je prezo de 68 DM plus 2,50 DM sendokostojn.

Nomo/Adreso _____

Dato: _____

Subskribo: _____

Regenzo

Rolf Beau (kiu kompilis kun la redakcia kunlaboro de **Ino Kolbe**): *Esperanto in Leipzig und Umgebung 1945-1991 (Heft 1: Chronologie der Zeitabschnitte)*. Eldonis: Germana Esperanto-Asocio (federacilanda sekcio de Saksio), Althen, 1999. (Grafika prilaboro: Joachim Schulze. Produktis: Rolf Beau). 195+5 paĝoj.

Ĉi tiu nove aperinta libro dokumentas la flusojn kaj malflusojn de Esperanto en la tuta GDR kaj neniel nur pure lokajn, klubajn okazaĵojn, kiel la titolo povus sugesti. Ĝi estas instrua legaĵo por historie interesitaj LEA-membroj kaj germanaj esperantistoj ĝenerale. Tuj post la fino de la dua mondmilito la Esperanto-agado singarde revekigis en Lepsiko kaj Saksio, ne alie ol en la okcidentaj partoj de Germanio. Temis ĉi tie en atentinda grado pri agado en la kadro de SAT. Sed jam en 1949 komenciĝis ŝtata agado celanta subpremi ĉian publikan agadon favore al Esperanto. Nur en 1956 la ĉielo heliĝis sufiĉe, ke unuaj bultenoj ekaperis kaj oficiale permesitaj kunvenoj eblis. Ĝis la fondo de la Centra Laborrondo de Esperanto-amikoj en la Germana Kulturligo – poste GDREA – pasis ankoraŭ naŭ jaroj. Sekvis jaroj de vigla grupa vivo, kies internaciaj kontaktoj tamen ne restis sen etanimaj malhelpoj flanke de la reĝimo.

Sed la vera forto de la libro ne estas la rerakonto de tiurilataj faktoj, kiujn en skiza formo preskaŭ ĉiu jam konas. La valoro de la libro estas ĝia dokumenta materialo, kiu pli bone ol ĉiu ĝenerala priskribo redonas la etoson de nun jam historiaj epokoj, la tenacon kaj neevit-

eblan kompromispretecon de homoj, kiuj frontis la obstaklojn kreitajn de la reĝimo. Preskaŭ ĉiu paĝo estas abunde ilustrita per grafikajoj, fotoj, reproduktaj de originalaj dokumentoj.

GM

Kalendaro

08. majo: Jarkunveno de SLEA (Sveda Laborista Esperanto-Asocio) en Stokholmo. 'Ni kaptas la okazon ankaŭ deziri... prosperan agadjaron dum 1999. Tutkamarade P.Persson.' Svartviksvägen 14, SE-12352 Farsta

08-15.majo: Internacia Kongreso de la Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), Le Mans, Francio.
Inf: Jean Ripoché, 6 rue des Platanes La Gautrie, FR-72230 Amage,
Tel/fakso: +33-243 21 16 39

84-a Universala Kongreso de Esperanto, Berlin. 31 julio – 7 aŭgusto 1999
Inf.: LKK, d-ro Bengt-Arne Wickström, Weseler Str.17, D-10318 Berlin

H.E.F.A. informas:

La 'Sepa Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo' okazos de la 2-a ĝis la 9-a de oktobro 1999, en urbo Cambrils, provinco Tarragona (Katalunio-Hispanio).
Pliajn informojn havebla ĉe H.E.F.A. Apartado 15027, ES-08080 Barcelona
Tel: 937275021 kaj 93725421
Faksilo: 937836511

Retadreso: luis_serrano@mixmal.com

el la TTT-ejo de Progresema Esperanto-Forumo
(<http://members.tripod.lycos.nl/jakvo/index.html>)
prizorgata de k-do Jakvo Schram:

Car Busters

Movado de agemuloj ekestis por liberigi urbegojn eŭropajn de la aŭtoj. Kreskas la movado sin aŭdebligante pli kaj pli laŭte, trans baroj kaj naciaj kaj lingvaj. Unuafoje kuniĝis tiu ĉi movado ĉe kongreso nomata *Al Urbegoj Senaŭtaj* kie kunvenis ideoj, spertoj kaj kulturoj. Dum tiu sukceso oni lancis *Car Busters* (Aŭtofrakasistoj) gazeton kaj rimedocentron por daŭrigi ties impulson. Kiel kampanjo de "European Youth For Action" Eŭropa Junularo Por Agado), "Aŭtofrakasistoj" celas konstrui, priservi kaj subteni la internacian kontraŭ-aŭtan movadon.

LA GAZETO Kvaronjara kaj eldonata de agemuloj mem, *Aŭtofrakasistoj* kritikis la "aŭtokulturon" de nia socio kaj esploras pozitivajn alternativojn. Ĝi enhavas ĉion, de "rekta agado" tra la plej ĝisdataj esplorrezultoj ĝis bildstrioj kiuj mokas la industriojn aŭtan kaj petrolan. La gazeto servas kaj kiel informofonto kaj voko agemiga. Ĝi disdonas ideojn kaj informajn rimedojn ene de la movado kaj ankaŭ ĝi atingas pli ampleksan legantaron konsciigante la publikon pri transportotemaj kampanjoj kaj agoj de la tuta mondo. Tiel *Aŭtofrakasistoj* celas kaj instigi agemulojn novajn kaj nutri nunajn. La gazeto internacias ne nur pro la reportado: ĝi resumas ĉiun artikolon kelklingve. La eldonkvanto estas 3000: duonon distribuas profesiaj kaj agemuloj distribuistoj. Ĝi atingas informojn kaj vendejojn de libroj, bicikloj kaj ekologiaĵoj tra Eŭropo, Nordameriko kaj eĉ Australio kaj Japanio. Per legi kaj alkontribui la gazeton kontraŭ-aŭtaj kampanjistoj povas kunlabori kaj sin informi. Tiel la movado iĝas pli efika kaj kuntena.

Por ricevi provkzempleron, bonvolu sendi malgrandan donacon (proks. \$3) al

nia Liona adreso: CAR BUSTERS Magazine and Resource Centre 44, rue Burdeau, FR-69001 Lyon, tel.: +(33) 4 72 00 23 57; fax: +(33) 4 78 28 57 78, carbusters@wanadoo.fr, <www.antenna.nl/eyfa/cb>

Jen eltiraĵo el mesaĝo, kiu aperis en la novaĵgrupo soc.culture.esperanto. La plenan tekston interesitoj povas peti de la redakcio (GM):

Aŭgusto

Ecotopia [...] Okazos en Romanio la ĉiujara 'ekologiisma utopia' tendumado de la paneŭropa reto EYFA (trad: Eŭropa Junularo por Agado). Pliaj detaloj haveblas kaj havebliĝos ĉe la TTT-paĝaro www.antenna.nl/eyfa. [...] Estos eblecoj vojaĝi tien biciklokaravane, aŭ de Amsterdamo, NL, aŭ de Vilnius, LV. Kontakto (aŭ angle, germane aŭ france), Antje MOLTZ, Egerländerstr. 35, 86179, Germanio. Antje_molz@bigfoot.de.

(persona noto de Krayg:) Lastjare estis diskuto pri CarBusters kaj ties lingvouzado, dum kiuj la plejparto verŝajne kontraŭstaris la uzon de esperanto. Povus esti utilege organizi ion esperantan enkadre de ĝi aŭ la kunveno en Pollando en oktobro.

Oktobro

Daŭrigebla Transporto, de la Okcidento al la Oriento (trad.). Seminario subtenota de pluraj organizaĵoj, ink. 'CarBusters', kiu okazos en Pollando, provizore ĉe Krakovo, de la 20a ĝis la 25a. Pliaj detaloj havebliĝos de CarBusters kiam ili decidiĝos. Daŭrante unu semajnon, la kunvenon esploras la malakordon ke la Okcidento jam ekkonstatas ke tuta dependeco de la aŭto eraras, tamen la Oriento ripetas la samajn erarojn unu post la alia. Kaj ofte kuraĝigas ilin fari tion la Okcidentaj institucioj kiel la Eŭropa Unio kaj 'evolubankoj'. La programo celos disvastigi kampanjospertojn plie bene tra la eŭropajn landojn. La pruvoj el la Okcidento estos transdonataj al la Oriento laŭ utila stilo.

Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:
 Libera Esperanto-Asocio por german-
 lingvaj regionoj (LEA/G) / Freier Esperanto-
 Bund für deutschsprachige Gebiete
 (LEA/G)
 Renschener Str. 47, DE-77704 Oberkirch,
 (Tel.+Fax: (07802) 90 336)
 LEA/G per SAT en TTT:
<http://www.worldnet.net/~sat-esp/>
Redakcio / Redaktion:
 Gary Mickle (G.M.), Brüsseler Str. 6,
 DE-13353 Berlin, (Tel.: (030) 453 96 47),
 retadreso / Internet-Adresse:
 101.121591@germanynet.de
 Hans Rodewig (H.R.), Stammestr. 86D,
 DE-30459 Hannover
 Albert Stephan (AFS), adreso de LEA/G
 supre indikita / oben angegebene Adresse
 von LEA/G
 Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj;
 la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ
 rifuzi alsendaĵojn.
 Redaktofino: mezo de marto, junio,
 oktobro, decembro
 MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint
 vier Mal jährlich;
 abonprezo / Bezugspreis 15,- DM
 La membrotizo entenas liveradon de la
 buŝeno.
 LEA/G-konto: Jiri Proskovec
 n-ro 9168 434 Postbank Essen
 (BLZ 360 100 43)
 Represo de materialo permesita, se la
 fonto estas indikita.

P	A	L	I	I	I	A	L
O	R	N	I	T	O	L	O
P	U	T	A	E	G		
O	M	A	G	O	A	N	I
L	U	V	J	U	D	O	
A	D	V	E	R	S	U	L
M	I	I	T	V			
A	E	D	O	S	O	B	R
S	I	S	E	C			
O	K	V	E	S	T	I	G

solvo
 de la
 krucvort-
 enigmo
 el
 Magazino
 25

Enhavo:

	paĝo
Rezulto de la baloto 1999	1
Raporto de la estraro (1997 04 01 - 1999 03 31)	2
Kasraporto por la jaro 1998 (K. H. Kersting)	3
«Salutoj el Oberkirch»	4
Kolektiva konvencio	5
Komentario (A. Stephan)	5
Legendo de la Viena Arbaro (Petro Jayer)	6
Naciismo estas merdolo: la ĉi-jara berlina Paska Marŝo... (Gary Mickle)	8
Pensio por demisiinta ministro (AFS)	11
Kompensajo (AFS)	11
Malsato (AFS)	11
Vivu la ... Vivu la ... Vivu la stel'? (Tobias Meißner)	12
Ĝenerala Konsilantaro de SAT (laŭ alvoko de Pelle Persson)	13
Ricarda Buch en <i>Contraste</i> pri SIL-renkontiĝo kaj Esperanto (GM)	14
Izraelio: la bredado laŭ la ritmo de la Sankta Skribo (Maryvonne Robineau)	15
Laboristaj esperantistoj plenigas la kason	18
Sennacieca mono	18
Kultura Esperanto-domo	19
La 7a Internacia Turisma Semajno en Malto	20
72a kongreso de SAT	20
<i>Esperanto in Leipzig und Umgebung (Rolf Beau):</i> recenzo de G. Mickle	22
Kalendaro	22
Car Busters	23